

Kálmán Kalocsay
Kion fari por la Esperanta literaturo ?
Claude Gacond, 427-a radioprelego, 1971.12.15 & 18

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

A.- Ni hodiaŭ legos al vi erojn el artikolo, kiuj ŝajnas al ni tre grava. Ĝin verkis Kálmán Kalocsay, kaj ĝi aperis en la revuo *Hungara Vivo*, 1971, numero 3-a, okaze de la okdeka jariĝo de la iama ĉefredaktoro de *Literatura Mondo*.

Cl.- Tiu alvoko titoliĝas *En amara horo*, kiel la poemo, kiun ni legis al vi la pasintan semajnon. Fakte ĝia stilo estas pli ĵurnalista : *Kion fari por la Esperanta literaturo ?*

A.- Kalocsay komencis ĝin skribante :

Cl.- *Multe oni meditas nuntempe pri la sorto de la Esperanta literaturo ; tio montras, ke por tio ekzistas kaŭzo malkontentiga.*

A.- Kalocsay poste rememorigas, ke UEA eĉ estigis komisionon por la studo kaj solvo de la ĉi-rilataj problemoj, kaj li daŭrigas :

Cl.- *Laste V. Benczik artikolis en **Hungara Vivo** kaj provis trovi balzamon por la vundoj de la Esperantaj Muzoj. Li skribas, ke la esperantistoj estas fieraj, eble tro fieraj pri sia literaturo. Tamen, ĉu vere oni povas ĉi tion aserti decide ? Pri kio oni estas fieraj, tion oni submetas kaj vartas, tio estas, se temas pri literaturo, oni ĝin aĉetas kaj legas. Sed la meza eldonnombro de Esperantaj libroj estas 1000 kaj tio ne montras tumulton da aĉetemuloj.*

A.- Kalocsay poste rimarkas, ke la situacio de la fakliteraturo estas ankoraŭ malpli brila, ke la Esperanta libro-eldono ne povas vetkuri kun la tempo, kiu rapide eksmodigas fakliteraturon, kaj ke beletro almenaŭ estas pli malpli tempo-rezista, kaj ke vole-nevole, ni devas rigardi la literaturon kiel ĉefan eldonotaĵon, se entute ni volas, ke io estu eldonata. Kaj li daŭrigas per teksto, kiu ŝajnas al ni ege grava. Ni esperas, ke multaj geaŭdantoj ĝin meditos :

Cl.- *Ni devas voli (ke io estu eldonata), ĉar ĉesigo de libroeldono estus fatala por Esperanto. En 1895, certa sinjoro, en letero skribita al **La Esperantisto**, pridubis la bezonon de la **Biblioteko**, kiu estis serio de libroj kun literatura enhavo. **Zamenhof** tiam respondis : « Floros la Biblioteko, floros ĉio, falos la Biblioteko, falos ĉio. » Kaj li emfazis, kiel favoran efikon li spertis de sia traduko de Hamleto, kiel ĝi donis al la movado novan energion, helpis unuigi la disopiniantojn. Ni opinias,*

A.- konkludas Kalocsay,

Cl.- *ke la Zamenhofa devizo ankaŭ nun estas valida : **Floros la literaturo, floros ĉio, falos la literaturo, falos ĉio.***

A.- Poste Kalocsay provas respondi al la demando :

Cl.- *Sed kiel trovi la eblaĵojn por tiu florado ?*

A.- Kalocsay konstatas, ke la libro-eldonado troviĝas en « peka cirklo ». La ekziston de literatura eldonado ni povas certigi nur per la konsiderinda pligrandigo de la eldonkvantoj. La nuna mizera malmult-ekzemplereco kaŭzas :

Cl.- *ke la libroj estas multekostaj, sekve nesufiĉe aĉetataj, sekve ne eldoneblaj pli mult-ekzemplere ; ke la eldonejoj ne povas pagi honorarion, tial talentuloj, se ili volas vivi per sia literatura laboro, verkas, eĉ devas verki nacilingve.*

A.- Kalocsay opinias :

Cl.- *ke la ĉefrimedo el tiu situacio estas **organizo**. Tiu organizo devus unue fari **merkatesploron**, kiel siatempe **Literatura Mondo** entreprenis inter siaj klientoj.*

Kálmán Kalocsay
Kion fari por la Esperanta literaturo ?
Claude Gacond, 427-a radioprelego, 1971.12.15 & 18

A.- Poste Kalocsay nin atentigas, ke la homoj aĉetas libron, se ĝi estas videbla en montrofenestro de librovendejo aŭ se oni ŝovas ĝin sub ilian nazon. Kaj li registras unu el la malsankaŭzoj de la nuna situacio per tiuj vortoj :

Cl.- **Manko de taŭga kolportado** : Oni devas do organizi la vendadon de la libroj : en ĉiu urbo kaj en ĉiu grupo troviĝu **librodelegito** aŭ **libro-responsulo** okupiĝanta pri la prezento, antaŭnazon-ŝovado kaj vendado de libroj Esperantaj. Por ke li havu por tio emon, oni devas apliki la **fenican inventaĵon** : li ricevu procentaĵon laŭ la venditaj libroj.

A.- Kalocsay montras, ke eĉ en la kadro de la Kongresoj, lertaj kolportistoj devus uzi rimedojn por ŝovi librojn sub la nazon de la kongresanoj. Poste li montras, ke **mankas favora etoso por la libroj**. Ni ree citas lin :

Cl.- *Mi jam aŭdis aŭ legis: « Kial mi legu novelojn aŭ poemojn en Esperanto, kiam ankaŭ en mia gepatra lingvo mi ne legas tiaĵojn ? »* Lerta « libro-delegito » povus lin konvinki, ke dank'al Esperanto li povos do havi tiajn plezurojn, kiajn alie neniam li akirus. Emfazi la gravecon de la literaturo, veki pri ĝi intereson oni devus en la Esperantistaj grupoj kaj gazetoj.

A.- Kaj Kalocsay donas veran labor-programon, el kiu ni citas erojn :

Cl.- La **grupoj** ofte ne scias fari por si programon en la klubvesperoj. Nu, oni povus tie interese **konigi librojn** kaj tuj **vendi** ilin al la interesiĝantoj. Se temas pri poemlibro, oni povus fari prelegon pri iu poemo kun la titolo : **Kial ĝi estas bela ?** La Hungara Radio havis tian programeron tre ŝatatan kaj post ties dissendo tuj kreskis la debito de la poemlibro entenanta la pritraktitan poemon.

A.- La naciaj societoj devus fari komisionon, eĉ konstantan komitaton el inteligentaj literatoroj, kiuj ellaborus por la grupoj **interesajn programojn**.

Cl.- *Fine la literaturo povus ankaŭ **aktivigi** la klubanojn : ili devus deklami poemojn, reciti prozon, ludi unuaktaĵojn. [...]* En la iama **Rondo de Baghy** la rondanoj sopire atendis la tempon de la proksima kunveno.

A.- Fine Kalocsay parolas pri la gazetoj, kaj liaj vortoj estas tute pravaj :

Cl.- *La anemiaj recenzoj, kiuj aperadas kun pedantaj riproĉoj kaj ŝablonaj laŭdvortoj, nemulte utilas, ĉar ili ne vekas la intereson de la leganto kaj misagordas la aŭtoron. Tiom pli, ke la kompatinda novelisto aŭ poeto devas kontenti je tiu magra nutro : plu neniam lia verkaĵo estos menciata kaj lia vivoverko mortos kune kun li. Kiu ja pritraktas la verkaĵojn de Hohlov, Emba, Adamson, Newell kaj aliaj ?*

A.- Kalocsay konkludas tiun kritikon proponante, ke la gazetoj dediĉu lokon, proporcian al sia amplekso, por literaturaj studoj kaj esoj (studetoj, eseetoj). *Tio utilis ankaŭ al la gazetoj mem, kiuj ne malofte estas dezerte seninteresaj.*

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !